# INTER NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 236 Decembro, 2005

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20

✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩ ✩

## FELIĈAJN FESTOTAGOJN

La redakcio de ***Inter Ni*** deziras al ĉiu leganto ĉion la plej bonan dum la ĉi-monataj festoj de Zamenhof-tago, Kristnasko, kaj la aliaj festaj tagoj je la fino de la jaro. Ni ankaŭ esperas, ke vi ĝuas nian gazeteton, kaj ke vi tuj renovigos vian abonon por la venonta jaro. Dankon pro via partopreno inter ni en nia agado, kaj sincerajn bondezirojn por sukcesoplena nova jaro.

— via redakcio

## RETMESAĜA DEMANDO

Estimata Redaktora Moŝto:

Lastatempe mi akiris komputilon. Nun mi estas inter la modernuloj kaj povas sendi kaj ricevi mesaĝojn per la reto. Pri tio mi fieras.

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis mesaĝon de al mi nekonata vidvino en Niĝerio. Ŝi deziras enmeti grandan sumon da mono en mian bankkonton. Ŝajnas, ke ŝia lastatempe mortinta edzo akiris la monon ne tute laŭleĝe, kaj pro tio ŝi ne povas sendi la monon eksterlanden per normalaj kanaloj. Kompreneble, mi deziras helpi ŝin (aparte ĉar ŝi antaŭnelonge fariĝis vidvino). Ŝi ankaŭ promesis doni al mi sufiĉan grandan donacon por montri, ke ŝi estas tre dankema al mia helpo.

Mi scias malmulton pri ĉi tiaj aferoj. Ĉu vi povus konsili min?

Ĉiam fide al via juĝo, mi restas

Kon Fu Zita

Respondo sekvas ➠

Tre estimata S-ro Zita,

Multan dankon pro via reta enketo. Ankaŭ mi ricevis la saman mesaĝon de tiu sama nekonatulino, kaj multajn similajn. Sed mi ne kredas ilin. Anstataŭ povra vidvino kiu deziras mian helpon por fari peketon, mi imagas al mi ruzan fiŝiston kiu allogas min por ŝteli mian monon. Se mi konsentus fari ion kontraŭleĝan, kaj poste oni ŝtelas mian monon, al kiu mi rajtus plendi?

Multe pli saĝa, moderna agado estas viziti Internacian Televidon (ITV), la unuan televidkanalon tute en Esperanto, ĉe <http://internacia.tv/>.* Tiel vi senzorge povas ĝui informoplenajn, amuzajn programerojn kaj ankaŭ, se vi deziras, mondonaci por subteni progresigan laboradon.

Samideane salutas

via redaktoro

*Okaze de teknikaj malfacilaĵoj (aŭ se vi uzas Mackintosh), eblas provi ankaŭ du rektajn adresojn:
<mms://itv.interrogacaodigital.net/itv>
<http://www.interrogacaodigital.com/stream/itv>

## LETEROJ AL PARLAMENTANO DE NOVA DEMOKRATIO

N-ro 2

Kara amiko:

Dankon pro via lastatempa letero. Plaĉas al mi ke, kiel mi, vi ĝuegas vian laboron kiel parlamentano.

Kiel mi skribis en mia lasta letero, estas sep institucioj kiuj fundamentas demokratian registaron. Mi scias ke viaj ĉiutagaj luktoj, en nova demokratio, estas establi kaj defendi tiujn sep instituciojn. Ĉi tie, en Kanado, ni jam havas la fundamenton; do niaj problemoj ne samas al la viaj.

La plej granda problemo, kiun havas nia matura demokratio, estas la malrapida sed neŝanĝiĝema regreso je la procento de voĉdonantoj.

Kial okazis ĉi tiu regreso? Estas malfacile respondeble. La ĉefaj kialoj por ne voĉdoni, kiujn mi aŭdas en mia distrikto, estas la sekvantaj:

1. „Mia voĉo estas nur unu el miloj aŭ milionoj; do ne gravas se mi voĉdonas aŭ ne; do mi ne voĉdonos.”

2. „Mi ne vidas la diferencon, kiun la registaro faris aŭ faros pro mi; do ne gravas al mi kiu starigas la registaron; do mi ne voĉdonos.”

3. „Mi kredas, ke la politikistoj estas tute samaj, t.e. nebonaj aŭ neutilaj aŭ mensoguloj; do voĉdoni estas sencela; do mi ne voĉdonos.”

La unuan respondon oni trovas en io ajn sistemo de balotado, ne nur en modernaj demokratioj kiel Kanado. Civitano, eĉ civitano kiu interesiĝas pri la politiko, malfacile vidas, kiel lia voĉo faros diferencon. Rarega estas la okazo, en grand-skalaj balotadoj, ke unu voĉo faras la diferencon inter venkigo kaj malvenkigo. Do ŝajnas al mi, ke ĉiu voĉdonulo ja devas vidi sian voĉdonadon kiel agadon de demokratia virteco kaj fiereco. Se ne, mi ne scias ion konvinkan. Ni voĉdonas ĉar ni povas.

Pri la dua respondo mi pli maltrankviliĝas. Estas simptomo de la fakto ke, en Kanado, la plejmulto ĝuas komfortan vivmanieron. Ne estas kiel en via lando, kiu ĵus suferis internan militaĉon; via lando, kie la ekonomio estas malfacile resaniĝonta; via lando, kie la aŭtoritatismo estas hieraŭa memoro kaj hodiaŭa danĝero. Ĉi tie, male, milito estas malproksima memoro. La ekonomio fartas pli-malpli bone, la plejmulto trovas laboron, la vivmaniero estas komforta laŭ la normoj de la mondo. Malplimultaj estas la egaj maljustecoj; la viktimoj de maljustecoj, kiel la indiĝenoj aŭ la malriĉuloj, havas nek fortajn nek unuigajn voĉojn.

Fakte, la politikaj opinioj de nia komforta plejmulto estas maldetalaj. La grandega plejmulto de nia popolo zorgas pli pri siaj domoj, siaj familioj, aŭ siaj laboroj, ol pri la politiko. (Tio ne estas kritiko, nur fakto.) La „demokratia ironio" estas ke, se vi tro sukcesas kaj via demokratio produktas la pacon kaj la bonfarton, ĝi produktas ankaŭ certan „molecon" je siaj demokratiaj radikoj.

Kiel mi ĵus skribis, mi maltrankviliĝas pli pri la dua respondo ol la unua. Sed el la tri respondoj, efektive la tria estas la plej danĝera. La tria respondo esprimas ion, kio minacas la demokration mem.

Ni havas civitanojn, kiuj kredas, aŭ kiuj diras ke ili kredas, ke la partioj kaj la politikistoj estas tute samaj, tute koruptitaj, tute meminteresitaj. Eble estas speco de la maldiligenteco aŭ de la moleco, pri kiuj mi jam skribis; alivorte, estas nur senkulpigo por fari nenion. Sed se ne, estas ja dura cinikeco. Kaj ĉi tiu dura cinikeco kondukas al la ideo, ke la demokratio ne valoras pli, kaj eble valoras malpli, ol la aŭtoritatismo.

Ĉu vi estus surprizita se mi dirus, ke la ideo, ke ĉiu estas mensogulo, minacas la demokration unue ĉar ĝi estas iomete vera? La politikistoj – almenaŭ tiuj, kiuj sukcesos – konas kiamaniere entombigi la veron kaj tiamaniere „svingigi la homamasojn." Oni entombigas la veron, ĉar oni scias ke tio, kio valoras je balotadoj, ne estas la vero sed estas tio, kion la popolo kredas. Ordinaraj civitanoj, kiuj ne multe zorgas pri la politiko, estas facilaj celtabuloj por spertaj „vero-entombigantoj."

Sed la ideo, ke niaj politikistoj estas ĉiuj koruptitaj kaj meminteresitaj mensoguloj, minacas la demokration due, ĉar ĝi estas plimulte malvera. Laŭ mia sperto, la ega plejmulto de kanadaj politikistoj estas decaj, honestaj, laboremaj reprezentantoj.

(Bonvolu kredi min…) Jes, de tempo al tempo ili kaŝludas kun la vero. Sed por mi, kiu vivas mian laborvivon ĉirkaŭitan de politikistoj, estas facile ekvidi kaj malkaŝi tiujn ruzojn.

Mi opinias, ke la kapableco aŭskulti politikajn paroladojn, kaj diferencigi la veron de la malvero, estas unu el la plej gravaj kapabloj de la demokratia civitano. Tiel armita, la civitano povas eniri la civitan arenon sen bezono de tiu dura cinikeco, kiu mortigas la civitan spiriton.

Ho ve! La tempo flugas. Mi estas skribinta jam tro longe. En mia venonta letero, mi priskribos la multajn ruzojn kun kiuj niaj politikistoj entombigas la veron, kaj la fosiloj, kun kiuj oni povas eltombigi ĝin.

— Graham Steele

Noto de la redaktoro: Ĉi tiuj ideoj ege valoras por ĉiuj, kiuj loĝas en demokratio, kie ajn ĝi troviĝas. Ĝis la 23-a de januaro 2006, kanadanoj travivados nacian voĉdonan kampanjon. Tio estas bonega oportuno por ekzerci sin al la gravaj kapabloj necesaj por loĝi en demokratio, pri kiuj Graham skribis en sia letero.

## TRANSLOKIĜO DE LA ESPERANTOMUZEO

Por la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj komenciĝas nova fazo. Ni transloĝiĝis en pli taŭga kaj multe pli facile alirebla loko. Temas pri nove restaŭrita palaco en la centro de Vieno, tute proksime de la antaŭa loko. Jen ĝia adreso:

Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo
Palais Mollard
Herrengasse 9
Vieno

Ni ankaŭ havas novajn deĵor-horojn, kiuj validas ekde la remalfermo jam en novembro:

ESPERANTOMUZEO: lun.-merkr. kaj vendr.-sab.: 10h00 - 14h00; ĵaŭde: 15h00 - 19h00
KOLEKTO por PLANLINGVOJ: lun.-merkr. kaj vendr.: 9h00 - 16h00; ĵaŭde: 12h00 - 19h00

Sed bonvolu direkti ĉiujn sendaĵojn al la sekva adreso :

Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo
Josefsplatz 1
1010 Vieno
Aŭstrio

Koran dankon kaj sincerajn salutojn,
Kathrin Delhougne
<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/esp_es.htm>